

PENSEO

N-ro 249

Jul. / 2012

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 23-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

Anteo (Ĉinujo)



pasio ŝlosita

estas en la domo kun kateno.
eĉ dum vintro ĝi restas ribela.
la instinkto ne komprenas
kio estas ĉelo.
inter la ĉielo dika kaj la tero dura
la volo staras kiel monto elpremita.
ekster la nigra arbaro flugas birdoj senflugilaj.
pulsas ondoj sur nebulo.
ŝvito kaj sango fluas tra la tuboj.
kie kuŝas la valo por savo?
ŝvelo. rompiĝo. putro.
libereco venas ĉe la morto regalema.
ventego pikas la trunkon.
tremo.
folioj ekfalas. kaj neĝo kun akvo.
nudeco montriĝas sub la luno seka.
danke al vermoj vorantaj vermojn,
la vundo fermiĝis.
fajro plue dormu
interne de sako sub nulo.
la travida korpo jam sin metas en kristalon.

Benjameno KRAŬS (Usono)



Post la mondo

Ĉi mondo ne estas la limo de l'vivo;
vi portos eksteren l'animon de vi.
Malgraŭ la projektoj, malgraŭ la motivo
vi trovos vin aŭ kun Diablo aŭ Di'.

Vi alvenas ĝin kvazaŭ la lokomotivo,

neniam paŭzante eĉ por la feri'.
Ĝi estas nur via, la prerogativo
sed kial ne haltu, nur por terapi'?

Avertu Diablon pro lia salivo
kun kiu li fiksas la stampon de fi'.
Kaj ja timu Dion pro lia arĥivo
de pekoj, malbonaj faraĵoj de ni.

Ĉi mondo ne estas la fino de tempo
sed nur la komenco de viva printempo.



Mori (Usono)



Se mia nom' estus Ĉelsie

Se mia nom' estus Ĉelsie
kaj Bill estus mia paĉjo
mi povus esti, senmerite
estrarano de grandaj firmaoj
kaj ricevi honorarion
por fari nenion
kaj ĉar neniofarado
estas iomete teda
mi povus, senhezite,
okupi altan postenon
ĉe fama korporacio
kun granda salajro!
Sed ĉar mi ne estas Ĉelsie
kaj Bill ne estas mia paĉjo,
mi ja devas labori...kaj labori

dum jaroj kaj jardekoj
revante pri tio, kion Ĉelsie akiris
fulmorapide, senmerite!

*

Ho, se mia nom' estus Ĉelsie
kaj Bill estus mia paĉjo !



Ŭel (Brazilo)



Robotikanĝelo

estis sonĝo.

kiel ĉiuj bonaj, rava.

venis kun flago de kiom ĝentila vento svingata.

sur la flago vidiĝis stelo:

verda...

en ĉiel' tiunokta mil, ĉiuj, steloj pro emocio pli
briletis,

kiam adiaŭis tiun novkreitan astron,

unikan en ĝia helverda brilo,

portantan kun si ne ordinaran emblemon:

veran amon por gvidi homaron perditan en

funda valo...

matene tie staris en mia ĉambro ĝi: stelhavanta

flago, en angulo,

silente viva, vive silenta, kvazaŭrigarde

antaŭen, en nekaŝebla invito al ies manoj...

ĉu miaj?!...

"jesss" ĝi sssuuusssuuriisss al mi!...

"n e!" mi balbutis. "n e, m i n e k o n a s v i n,

t u t e n e k o n a s... k i o e s t a s v i?"

"mmmmiii? mi estas aaammooogvardiaaanooo.

nur tiiio esstass mi, nenio pli..."

kaj, pli kaj pli, en ties sonadon mi
profundiĝis...


...

ĉu mi, vere, iam vekiĝis de tiu sonĝo? mi,
ververe, ne scias...

ĉu tio, en realo, estis sonĝo? reale, kiel scii?...



Leieladonna (Meksikio)



En la silento

La kareso de iu rigardo,

la kareso de iu rideto,

la silento por aŭskulti

la batadon de la koro,

estas tre teneraj kialoj,

varmaj kaj subtilaj por diri:

Mi amas vin ...

eĉ netuŝite,

eĉ sen esti proksimaj ...


eĉ sen muziko...

en la silento vi povas aŭskulti

la kanton de la vivo,

kaj la kanton de la amo ...

adorata...



Cezar (Germanio)



**Kial la najtingalo kantas
por mi, sed ne por vi?**

Mi povas klarigi tion al mi nur per tio,
ke vi vivas en alia tempuniverso ol mi,
laŭ certaj fizikistoj tio ja eblas.

Mi diru tiel, mi vivas en la plusa tempo
kaj vi en la minustempo,
ĉu vi ekkomprenas?

Por vi la akvoglaso estas ĉiam duone malplena,
por mi ĉiam duone plena... aŭ male,
iel tiel...

La idiota mondo,
kiun mi ne rigardas
kiel mondon mian,
en certa senco glitas de mi
kiel pizo de la muro,
sed evidente ne de vi.

Mi trovis mian
damnititan niĉon
en la fama ebena turo,
vi eble ne.

Mi trovis la najtingalon trilantan,
eĉ se nur en la interreto.
Sed vi trovis hejme
frenezigintan birdon,
kiu frapas vintre
malesperigante
viajn fenestrojn,
por ke vi helpu al ĝi.

Kaj vi eble sentas vin
nur minacata de ĝi.
Mi ne vere scias,
sed iel tiel devas esti.

Eble mi estas nur formiko
kaj vi estas giganto,
aŭ mi estas giganto
kaj vi unu el la sep nanoj
kiuj gardas neĝulinon
en ties vitra ĉerko.

Ni vivas en paralelmondoj
kaj tial ni ne komprenas nin
reciproke.



Paŭlo Silas (Brazilo)



POR LA BONO DE LA PATRIO

Lastan momenton sur voj' al vivfino
Eta sola infan' triumfomarŝis.
Ene de lukto ĝi estis viktimo.
Devosento instigis ĝin plu paŝi.

Fratmortiga sinten' pro patriamo
Movis tamburojn batalritme, tondre.
Celkonscie pluiris la infano
Kontraŭ la militistar' militfronte.

Ĉar al ĝi ĝiaj gepatroj diris:
Antaŭuloj la filojn armis.
Ili landon savgardis tutcerte.

Por, post malhel', la libero brili;
Niajn limojn rapidu garni!
Nepoj vivon ricevos herede.



Stanislavo Rynduch (Germanujo)




ESPERANTO-URBO

Aŭdu, aŭdu homo bona
 pri sukceso tre impona;
 "Multi-kulti" ĉie mortas,
 nur sukceson Herzberg portas.
 Ili trovis la patenton,
 uzu ankaŭ Esperanton!
 Herzberg famis un' kornuloj,
 nun ĝin famas la verduloj.
 La afiŝoj Esperantaj,
 por verduloj vojaĝantaj.
 La Sofio bona koro,
 pli valoras ol la oro.
 Tie kreskas idearo,
 de la esperantistaro.
 Ĝin vizitu senhezite,
 estos bone priservite.
 Pitoreska urbo bela,
 ĉio pure, altnivela.
 La kastelo- historio,
 Esperante la picejo.
 Ne forgesu monumenton,
 Esperanto-fudamenton!
 La urbestro Esperantas,
 eĉ paseroj tion kantas.
 Nepre venu kaj admiru,
 al aliaj ĉion diru!

oktobre 2010

Victor Hugo (1802-1885)



La akvoguto

El marmoro faletis la fonto
 Al terura maro, pogutante.
 Oceano, de l'ŝipisto la fato,
 Diris: "Kion ci volas, plorante?"

Mi estas timego kaj tempesto,
 Mi finiĝas en la ĉielspaco.
 Ĉu iel utilas etula esto,
 Al mi, kiu estas giganteco?"

La fonto al abismo amara
 Diris: "Mi donas al vi, silente,
 Tion, kio mankas al Moŝto mara:
 Iom da trinkebla akvo, pogute."
elfrancigis



Tjeri (Francujo)



Wisława Szymborska (1923-2012)



IU KIUN MI OBSERVAS EK DE CERTA TEMPO

Ne restas engrupe.
 Ne kunvenas multnombre.
 Ne partoprenas amase.
 Ne celebras pompe.

Ne eltiras el si
 korusan voĉon.
 Anoncas nenion al.
 Ne konstatas nome de.
 En lia ĉeesto oni ne diskutas:
 kiu estas por kaj kiu estas kontraŭ,
 dankon, mi ne vidas.

Mankas lia kapo,

kie estas kap' ĉe kapo,
 kie paŝ' kunpaŝe, brak' ĉe brako
 antaŭen al celo
 kun flugfoli' enpoŝe
 kaj kun bier-botelo.

Kie, nur komence
 bukolike, amike,
 ĉar baldaŭ unu trupo
 kun alia grupo
 miksiĝos; kiu scias,
 kies estas, nu kies
 ĉi floroj, kaj ŝtonoj,
 ĉi vivuoj kaj bastonoj.

Nemenciita.
 Nespektinda.
 Dungito de la Urba Purigejo
 pal- mateniĝe,
 el loko de evento
 kunmetas, forportas, enĵetas ĉareten,
 ĉion, kio alnajlita al duonvivaj arboj,
 kio distretita en herbej' senforta.

Disŝiritaj tolstrioj,
 rompitaĵ boteloj
 bruligitaj pupoj,
 prironĝitaj ostoj
 rozarioj, fajfiloj kaj prezervativoj.

Iam li trovis kaĝon de kolomboj.
 Li kunprenis ĝin
 kaj tenas, por ke
 ĝi restu malplena.
tradukita el la pola



Helena Tylipska (Italujo)



Ĉineske

Josep V. (Katalunio)



Verso kaj homo

—laŭ ĉineska skemo Dekses-Silabo*

al
 poezia artbatal'!
 treiniĝo
 por vivlasta fal'

vort'
 paralele aŭ en ort'
 celtrafa
 aŭ misa agord'

skurg'-
 bato por maldeca burĝ'
 aŭ eble
 por amora urg'!

ĝu'!
 mallaŭtiĝu plene bru'
 averta
 pri fina vanu'

pens'
 laŭ modelo de Kurzens'
 tia viv'
 poezia senc'

Vejdo (Ĉinujo)



Bonvenon al Josep V.

—laŭ ĉineska skemo Dekses-Silabo*

vi
 Josep jen al poezi'
 ĉineska

ekas kun raci'

il'
versa de granda facil'
en mano
magias kun bril'

sent'
via en krea talent'
radias
glime en silent'

ĉu
altas parnasa konstru'?'
atingos
ni pene sen bru'

ŝat'
al vortludo, kara frat',
kondukos
al sukcesa stat'

mir'
ĉe ni pro via inspir'
spronas nin
al nova akir'

al
vi bonvenon el kor-val'
ni sendas
kun vina pokal'

**Dekses-Silabo (ĉine: Shiliuziling): ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa (x=senrima)*

Josep V. (Katalunio)

Al virino persa

—laŭ ĉineska skemo Heyebai*

Irano nigrevesta,
nesta
palaco
de l' nigreco pura:
nura

surfaco

religi-furoro
moro,
pri kio
sin okupas ajatol'?'
pri tol'
ne Dio!

al virino persa
versa
dediĉo:
la nigron -vi formetos
-tretos
feliĉo

**Heyebai (Losfolia Taso): ĉina fiksforma poemo el 6 versoj de 6,2:3;7,2;3 silaboj, laŭ rimaranĝo aab,ccb*
***Post vidi tre kortuŝan trukfoton (ĉe la blogo de Reza) kiu denoncis la religi-registaran sintenon kontraŭ virinoj en Irano, mi faris tiun ĉi poemon. La blogero de Reza titoliĝas "La ne realigitaj songoj".*


DERMATOZO

—laŭ ĉineska skemo Qinyuanchun*

haŭto skvama
mensa ŝildo
korpa fazo.
dek-unu jara
sub la harar'
rondoj etaj
sen emfazo.
jar' dudeka
amasatak'
malfacilas la razo
flavecaj
fariĝas ungoj
militkazo!

pomado kaj gazo
tinkturo
tutplena vazo.
ŝajne jen sana!
longas vivo

venos nova
la okazo.
nova agres':
fingrartrito
ruĝaj ventro kaj nazo,
ada juk'
tortur' ĉiama
psoriazo



oh, ĉio
kare viva en
freŝa aer'



**Qinyuanchun (Printempo en ĝardeno Qin)*: ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun po 13 versoj de 444,5444,447,354 / 6,35,5444,447,354 silaboj laŭ rimaranĝo *xxa,xxxa,xxa,xxa / a,xa,xxxa,xxa,xxa* (*x = senrima*)

Viktoro (Ĉinujo)

Sopire al hejmtero

—laŭ ĉineska skemo *Qinyuanchun**

mi restadas
multajn jarojn
kun korsufer'
en alia land'
ĉiu-hore
mi sopiras
al la hejmter'
en mia songĝ'
filmas bildoj
karaj riĉaj en aper'
kun alvok'
al ĝia sino
de ama sfer'

la impona river'
fluadas
kun granda tener'
en mia koro
ĉe ĝi sidas
la gepatroj
de kor-sincer'
kaj rizkampoj
ondumantaj
en orkolora prosper'

Zhuang Qixiong (Ĉinujo)



Kosmonaŭtoj

—laŭ ĉinesko *Tianxianzi**

Per feliĉa karavel'
rekte flugas al Ĉiel'
kosmonaŭtoj en Ĉini'
kun fidel'
de anĝel'
kaj mondpaco de model'.

Por estonta nubkastel'
ili laboros sur rel'
diligente kaj pene.
Kia bel'
kaj miel'
kun eterne glora cel'!

2012-6-16

Tianxianzi (Fea kanto): ĉina fiksfirma poemo el ses versoj de 7,7,73,3,7 silaboj, laŭ rimaranĝo *a,a,xa,a,a* (*x=senrima*)

Shengzhou-9

—laŭ ĉinesko *Yijiangnan**

Kosmoŝip'
flugas en spaco.
Ĉiuj kore hurais

pro diina donaco.
Al via paco!



*Yijiangnan (sopir-al-sudo): ĉina fiksforna poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).

Vejdo (Ĉinujo)

Sopire al la maro

je la naskiĝtago de Anniespera (2012)

—laŭ ĉineska skemo Yumeiren*
sopiras, ho, vi kara
al vasto mara
kiel fiŝo libera
naĝas pace per mov' leĝera

tie lazuras fluoj
sen ŝrikaj bruoj
nure bela pejzaĝo
glimas en mirinda miraĝo

tie multas trezoroj
de alt-valoroj
en akv-draka palaco
utilaj al saĝ' kaj sagaco

tie ondas pasio
de energio
akvestaĵoj konkure
sin pafas sob aŭ sor plezure

jen la maro de scio
kun verda prio
allogas Esperanto
vin al lernesplora konstanto

jen kial vi sopiras
kaj vi aspiras
al blua mar' profunda
al la akvosfero fekunda

*Yumeiren (Bebulino Yu): ĉina fiksforna poemo el du strofoj kun po kvar versoj de 7,5; 7,9; / 7,5; 7,9; silaboj kun para rimo.

Guozhu (Ĉinujo)



Neĝo en Junio

—laŭ ĉinesko Tiaoxiaoling*

Ŝoko, ŝoko —
junia neĝfloko!
Ŝvebas de aere
ŝirlibroj al-tere.
Rete, rete,
vidiĝas impete.



* Noto: okazis en multaj lokoj tra Ĉinio la eventoj ke post la enira ekzameno de universitatoj, ekzamenitaj lernantoj disŝiris siajn lernolibrojn en pecetojn kaj disĵetis ilin de superaj etaĝoj, tiel aperas la mirinda spektaklo de neĝado en junio.

**Tiaoxiaoling (flirta kanto): ĉina fiksforna poemo el ses versoj de 4, 6; 6, 6; 4, 6 silaboj, laŭ rimaranĝo de aa,bb,cc. La 4-silabaj versoj konsistas el du ripetaj vortoj. Kaj la unua vorto de la kvina verso devas esti el palindrome aŭ metateze ordigitaj silaboj de la lasta vorto de la kvara verso. ekz. rimi-miri; mora-arom; nomo-mono; roso-soro.

Maupassant (1850-1893)



La Cambro 11

Kiel ! Vi ne scias kial oni delokis S-ron la Unua

Prezidanto Amando ?

– Ne, tute ne.

– Cetere, li ankaŭ neniam sciis la kialon. Sed tio estas historio el la plej bizaraj.

– Bonvolu rakonti ĝin al mi.

– Ĉu vi ja memoras pri S-ino Amando, tiu bela, eta, magra brunulino, tiel eminenta kaj delikata, kaj kiun oni nomis Sinjorinon Margareta en la tuta urbo Longa-Markolo ?

– Jes, perfekte.

– Nu, aŭskultu. Vi memoras ankaŭ kiom ŝi estis respektata, estimata, amata pli bone ol iu ajn en la urbo; ŝi sciis akcepti, aranĝi feston aŭ almozdonan servon, trovi monon por la malriĉuloj, kaj distri la geknabojn per mil rimedoj.

Tamen, ŝi estis tre eleganta kaj tre koketa, sed el tiu platona koketeco kaj ĉarma provinca eleganteco, ĉar tiu malgranda virino estis provinculino, franda provinculino.

Sinjoroj la verkistoj, kiuj estas ĉiuj Parizanoj, ĉiutone laŭdkantas al ni la Parizaninon, ĉar ili konas nur ŝin, sed persone mi deklaras: la provinculino centfoje plimulte valoras, kiam ŝi estas de supera kvalito.

La aspekto de la delikata provinculino estas tute aparta, pli diskreta ol tiu de la Parizanino, pli humila, kiu nenion promesas kaj multe donas, dum plejofte la Parizanino multe promesas kaj senvestigata nenion donas.

La Parizanino estas la triumfo de la eleganta kaj impertinenta malvero. La provinculino estas la modesteco de la vero.

Malnaiva eta provinculino, kun ŝia aspekto de lerta burĝino, ŝia trompa naiveco de pensionulino, ŝia rideto kiu nenion diras, kaj

ŝiaj bonaj lertaj etaj pasioj, sed tenacaj, devas montri milfoje pli da ruzo, fleksebleco, virina invento ol ĉiuj kuniĝantaj Parizaninoj, por sukcesi kontentigi siajn gustojn, aŭ siajn malvirtojn, ekaperante nenian suspekton, nenian klaĉon, nenian skandalon en la malgranda urbo, kiu rigardas al ŝi per ĝiaj tutaj okuloj, kaj ĝiaj tutaj fenestroj.

S-ino Amando estis tipo el tiu malofta, sed ĉarma raso. Neniam oni suspektis ŝin, neniam oni pensus, ke ŝia vivo ne estus klara kiel ŝia rigardo, ŝia kaŝtankolora, varma, travidebla rigardo, sed tiel honesta – sed kiel scii?

Do, ŝi uzis admirindan ruzaĵon, genian inventon, de mirinda inĝenieco kaj nekredibla simpleco.

Ŝi elektis ĉiujn amorantojn en la armeo, kaj konservis ilin dum tri jaroj, la daŭro de ilia restado en la garnizono. – Jen. – Ŝi ne havis amon, ŝi havis sensojn.

Tuj kiam nova regimento alvenis al Longa-Markolo, ŝi informiĝis pri ĉiuj oficiroj, kiuj aĝis inter tridek kaj kvardek jarojn, ĉar antaŭ tridek jarojn ili ne estas ankoraŭ sufiĉe diskretaj, kaj post kvardek jarojn, ofte ili malfortiĝas.

Ho! si konis tiel bone la kadrojn kiel la kolonelon. Ŝi ĉion sciis, ĉion, la intimajn kutimojn, la instruadon, la edukadon, la fizikajn kvalitojn, la reziston al la laĉiĝo, la karakteron paciencajn aŭ violentajn, la riĉecon, la inklinon al la ŝparado aŭ la prodigemo. Poste ŝi faris sian elekton. Ŝi prefere elektis la virojn aspektante kvietajn, kiel ŝi, sed ŝi volis ilin belaj viroj. Ŝi ankoraŭ volis, ke ili havas nenion konatan amrilaton, nenion pasion kiu povus lasi spurojn, aŭ fari kelkan bruon. Ĉar la viro, pri kiu oni citas la amojn, neniam estas viro ja diskreta.

Selektinte tiun, kiu amos ŝin dum la tri jaroj de la reglamenta restado, restis nur ĵeti al li la poŝtukon.

Kiom da virinoj estus troviĝintaj embarasataj, estus uzintaj la ordinarajn rimedojn, la vojojn

sekvatajn de ĉiuj amorantinoj, estus amindumigitaj stampante ĉiujn etapojn de la konkerado, kaj de la rezisto, lasante iun tagon kisi la fingrojn, la sekvantan tagon la manartikon, la postan tagon la vangon, kaj poste la buŝon, kaj poste la ceteron.

Ŝia metodo estis pli rapida, pli diskreta, kaj pli certa. Ŝi aranĝis balon.

La elektita oficiro invitis danci la dommastrinon. Nu, valsante, kuntirata de la rapida movo, senkonsciigata per la ebrieco de la danco, ŝi alpremiĝis al li, kiel por sin doni, kaj ĉirkaŭpremis al li la manon per nerva kaj senĉesa premo.

Se li ne komprenis, tiam li estis nur stultulo, kaj ŝi pasis al la sekvanto, klasita laŭ la dua numero en la tekoj de ŝia deziro.

Se li komprenis, tiam la afero estis farita, sen skandalo, sen kompromitaj galantaĵoj, sen multnombraj vizitoj.

Kio estas pli simpla kaj pli praktika?

Kiom la virinoj devus uzi similan procedon por komprenigi al ni, ke ni plaĉas al ili! Kiom tio forigus malfacilecojn, hezitadojn, parolojn, movojn, maltrankvilojn, konfuzon, miskomprenojn! Kiom ofte ni pasas flanke de ebla feliĉo, ne suspektante tiun ĉi, ĉar kiu povas penetri la misteron de la pensoj, la sekretajn forlasojn de la volo, la mutajn alvokojn de la karno, la tutan nekonataĵon de virina animo, kies buŝo restas silenta, okulo nepenetrebla kaj klara?

Tuj kiam li komprenis, li interkonsentis pri rendezuo kun ŝi. Kaj ĉiam, ŝi atendigis lin dum unu monato aŭ ses semajnoj, por gvati lin, koni lin, kaj sin gardi pri kelka danĝera manko.

Dum tiu tempo, li strecis la carbon por scii kie ili povus senriske kune renkontiĝi, li imagis malfacilajn kaj ne tre sekurajn kombinaĵojn.

Poste, okaze de kelka oficiala festo, ŝi mallaŭte diris al li:

– Nu! mardon vespere, je la naŭa, al la hotelo de la Ora Ĉevalo apud la remparoj, vojo de

Vaŭzio, kaj demandu pri fraŭlino Klarisa. Mi atentos vin, precipe estu civile vestita.

Fakte, de antaŭ ok jaroj, ŝi havis meblitan ĉambron jare luprenitan en tiu nekonata gastejo. Estis ideo de ŝia unua amoranto, kaj ĉar ŝi trovis pratika la ideon, kiam foriris la ulo, ŝi konservis la neston.

Ho! nebona nesto, kvar muroj tapitaj per helgriza papero kun blujaj floroj, lito el abiligno, sub kurtenoj el muslino, brakseĝo zorge aĉetita de la gastejestro laŭ ŝia ordono, du seĝoj, littapiŝo, kaj la kelkaj necesaj vazoj al la sinlavado! Kion krome necesis?

Sur la muroj, tri grandaj fotografioj. Tri koloneloj sidantaj sur sia ĉevalo; la koloneloj de ŝiaj amorantoj! Kial? Ne povante konservi la rektan memorajon, la propran bildon de siaj amorantoj, eble tiamaniere ŝi volis nerekte konservi memoraĵojn?

Kaj, okaze de ĉiuj ŝiaj vizitoj al la Ora Ĉevalo, ĉu neniam ŝi estis rekonita de iu, vi diras al mi?

Neniam! Neniu!

La rimedo, kiun ŝi uzis estis simpla kaj admirinda. Ŝi imagis kaj aranĝis serion de kunvenoj pri bonfarado kaj kompato, kiujn ŝi ofte vizitis, kaj iafoje ne ĉeestis. La edzo konis ŝiajn piajn almozdonojn, kiuj multege kostis al li, kaj li vivis suspektante nenion.

Do, kiam la rendezuo estis definitiva, dum la la vespermanĝo, antaŭ la domservistaro, ŝi diris: – Ĉivespere mi iros al la Asocio de la zonoj el flanelo por la paralizitaj maljunuloj.

Kaj ĉirkaŭ la oka ŝi eliris, eniris en la asociejon, tuj reeliris, trapasis diversajn stratojn, kaj kiam ŝi troviĝis sola en kelka strateto, en kelka malluma angulo kie ne estis oleolampo, ŝi demetis sian ĉapelon, anstataŭis ĝin per servistina kufo, kiun ŝi alportis sub sia manteleto, malfaldis blankan antaŭtukon alportitan per la sama maniero, nodis ĝin ĉirkaŭ sia talio, kaj portante en mantuko sian urban ĉapelon kaj la vestaĵon, kiu post momento kovros ŝiajn ŝultrojn, ŝi trotante

foriris, maltima, kun la koksoj malkovritaj, kiel malgranda hejmamulino, kiu faras aĉeton, kaj eĉ iafoje ŝi kuris, kiel ŝi urĝegas al ŝi.

Kiu do estus rekoninta, en tiu maldika kaj vigla servistino, sinjorinon la unua prezidantino Amando?

Alveninte al la Ora Ĉevalo, ŝi supreniris al sia ĉambro, kies ŝi havis la ŝlosilon, kaj la dika gastejestro, mastro Truvo, vidante pasis ŝin de sia bufedo, murmuris:

– Jen fraŭlino Klarisa, kiu iras al siaj amoj.

Li ja supozis ion, la ruza dikulo, sed li ne serĉis plimulte scii pri tio; kaj, jes ja, li estis ja surpriza, kiam li eksciis, ke sia klientino estis sinjorino Amando, sinjorino Margereta, kiel oni diris en Longa-Markolo.

Nu, jen kiel okazis la horora malkovro.

Neniam fraŭlino Klarisa venis al siaj rendezuoj du sinsekvaj vesperoj; neniam, neniam, ŝi estis tro ruza kaj tro singardema por fari tion. Kaj mastro Truvo ja sciis tion, ĉar eĉ unufoje, jam de ok jaroj, li vidis ŝin reveni la postan tagon de vizito. Ofte eĉ, okaze de tagoj de intensa aktiveco, li disponis la ĉambron dum unu nokto.

Nu, dum la lasta somero, S-ro la Unua Prezidanto Amando forestis dum unu semajno. Tio okazis dum la julia monato, sinjorino havis ardojn, kaj ĉar ili ne povis timi esti surprizitaj, la mardon vespere, forlasante sian amoranton, la belan komandanton de Varanĝelo, ŝi demandis al li, se li volis revidi ŝin la postan tagon:

– Kiel do!

Kaj ili interkonsentis, ke ili sin retrovos je la kutima horo la merkredo. Ŝi mallaŭte diris:

– Se vi alvenus la unua, mia karulo, vi kuŝigus por atendi min.

Ili sin kisis reciproke, kaj ili disiĝis.

Nu, la postan tagon, ĉirkaŭ la deka matene, dum mastro Truvo legis la Tabelaĵojn de Markolo, la respublikan gazeton de la urbo, de malproksime, li kriis al sia edzino, kiu senplumigis kortobirdon en la korto:

– Jen la ĥolero en la lando. Hieraŭ viro mortis en Vovinjo.

Poste li ne plu pensis pri tio, estis multe da personoj en sia gastejo, kaj la aferoj glatege iris.

Ĉirkaŭ tagmezon, vojaĝanto sin prezentis, piede, speco de turisto, kiu servigis al si bonan tagmanĝon, post trinkinte du absintaĵojn. Kaj, ĉar estis varmege, li almenaŭ sorbis unu litron da vino, kaj du litrojn da akvo.

Poste li trinkis sian kafon, sian malgrandan glason da brando, aŭ prefere tri malgrandajn glasojn. Poste, sentis sin iom peza, li petis ĉambron por dormi dum unu aŭ du horoj. Ĉar ne plu estis unu sola ĉambro neokupita, la gastejestro, post konsultinte sian edzinon, donis al li la ĉambron de fraŭlino Klarisa.

La viro eniris en la ĉambron, kaj ĉirkaŭ la kvina vespere, ĉar oni ne vidis lin reeliri, la mastro iris vekti lin.

Kia miro, li mortiĝis!

La gastejestro malsupreniris por konsulti sian edzinon:

– Diru do, la artisto, kiun mi lokis en ĉambron dek unu, mi ja kredas, ke li mortiĝis.

Ŝi alĉielen levis la brakojn:

– Neeblas! Sankta Dio! Ĉu tio estas la ĥolero?

Mastro Truvo skuis la kapon:

– Mi prefere kredus al cerba kongesto, konsiderante, ke li estas nigra kiel la vinfeĉo.

Sed la edzino, konsternata, ripetis:

– Necesas ke ne diru tion, necesas ke ne diru, se ne oni kredos pri la ĥolero. Iru deklari la morton, kaj ne parolu. Ni kunportos la korpon nokte, por ke oni ne vidu nin. Kaj, ne vidite, ne sciite, mi interkonfuzas.

La viro murmuris:

– Fraŭlino Klarisa venis hieraŭ, do ĉivespere la ĉambro vakos.

Kaj li iris serĉi la kuraciston, kiu konstatis la forpason, pro kongesto post tro abunda manĝo. Poste estis konvenite kun la polica komisaro, ke oni kunprenos la kadavron ĉirkaŭ noktomezon, por ke nenion oni suspektas en la

